

Miroslav Malovec



**La vivo kaj verko de
Theodor Kilian (1894-1978)
aŭtoro de lernolibroj
de Esperanto**

Junago

Theodor Kilian naskiĝis la 26-an de septembro 1894 en Ivančice u Brna, estante la plej juna el ok infanoj de kampulo. Kiel etulo li devis paŝti anserojn kaj poste helpi dum ferioj ĉe ĉiuj laboroj ĝis la jaro 1929. Tiam en sia 35-a jaro li edziĝis.

Post burĝa lernejo li studis en instruista instituto kaj en 1913 li komencis labori kiel instruisto. Sed jam en 1914 li soldatiĝis en Brno, en 1915 li estis sendita al Krakovo kaj post 11 monatoj al la fronto, kie li en 1915 falis en rusan kaptitecon. Kvin jarojn li estis el Ruslando, lastajn 4 jarojn en Siberia Tomsk, kie li laboris en lignaĵista laborejo.

Esperanton li unue renkontis en Ivančice kiel 14-jara knabo ĉe sia kuzino, kiel 20-jarulo li aĉetis Esperanto-ŝlosilon de Ĉefeĉ, sed vera esperantisto li fariĝis en Tomsk. Lokan E-klubon vizitadis homoj el 10 naciecoj, kiuj vigle diskutis pri aktualaj problemoj.

En 1920 sindikatoj sendis transporton por 200 militkaptitoj, kiuj de Samara (Kujbiŝev) tra Pollando revenis hejmen. Samjare li komencis instrui en Dolní Kounice, une en la baza, poste burĝa lernejo kaj fine en 1928 en Supera Komerca Lernejo en Třebíč.

Sian tutan liberan tempon li dediĉis al Esperanto. Li gvidis pli ol 20 kursojn, 3 radio-kursojn, verkis broŝuron *Esperanto kaj ĝia kreinto*, kaj lernolibron de Esperanto.

Grave li kontribuis al esperantlingva radiostacio Verda Stacio en Brno per prelegoj propraj kaj tradukitaj kaj ankaŭ per tradukoj de radio-ludoj: De Ingnát Herrmann **La pentristo kaj fiakristo**, de Dalibor Chalupa **La frato de Prometeo** pri Edison kaj ĉefe de Karel Čapek la kontraŭfaŝisma dramo **La blanka malsano**. Tiu aperis libroforme en 1938 en Olomouc kaj en marto 1938 ĝin elsendis Verda Stacio kiel radio-ludon.

Dum la okupacio ĉia esperantista agado estis malpermesita. Post la milito li fariĝis instruisto en Třebíč kaj fondis tie lokan klubon la 16-an de decembro 1947.

Lia lernolibro aperis ankoraŭ 13-foje inter la jaroj 1946 – 1978. Plie li verkis ankoraŭ koncizan lernolibron por Somera Esperanto-Tendaro en Lančov ABC de Esperanto, kiun li kompletigis per vortareto de 808 plej uzataj vortradikoj.

La beletran verkon li kronis per traduko de poetisma-filozofia proza eseo de Otokar Březina *Konstruado en alto*, kiun la klubo eldonis post lia morto en 1982. La klubo ankaŭ akceptis lian nomon Klubo de Esperanto de Theodor Kilian.

Li mortis la 3-an de julio 1978 en Třebíč

Libroj de Theodor Kilian



Verkoj de Theodor Kilian

- **Esperanto a jeho tvůrce** (brošuro, 1934)
- **ABC mezinárodního jazyka** (brošuro, 1967)
- **Cvičebnice esperanta** (libro, 1964)
- **La mondo rakontas** (brošuro, 1970)
- **808 nejpoužívanějších slovních kmenů** (brošuro, 1966)

- **Tutsokola kongreso en Praha** (Verda Stacio, 16.8.1932)
- **Radio-kurso de Esperanto** (Verda Stacio, 1932-1933)
- **Jan Welzl – mistifiko?** (Verda Stacio, 1.4.1933)
- **Pri la sola cigana lernejo** (Verda Stacio, 29.4.1933)
- **Internacia Esperanto-konferenco en Vieno** (Verda Stacio, 19-24.5.1934)
- **85-a naskiĝtago de Masaryk** (Verda Stacio, 19.2.1935)
- **Ĉu estas Esperanto nur lingvo?** (Verda Stacio, 26.9.1935)
- **Momento el la vivo de d-ro Zamenhof** (Verda Stacio, 4.12.1935)
- **Pensoj je la naskiĝtago de Zamenhof** (Verda Stacio, 15.12.1935)
- **Enkondukaj vortoj por la "Aprila vespero"** (Verda Stacio, 1.4.1936)
- **Lernejoj en ĈSR** (Verda Stacio)
- **Vidindaĵoj en Ĉeĥoslovakujo** (Verda Stacio)
- **Radio-kurso 1936** (Verda Stacio, 1936)
- **Aleksandro la unuiginto** (Verda Stacio, 17.3.1937)

- **Můj život** (tajpaĵo, 1949)
- **Můj životopis** (tajpaĵo, 1952)
- **Co esperanto s Bezručem může a nemůže** (odpověď značce "gs" v deníku Práce)

Tradukoj de Theodor Kilian

ANONIMAJ:	Baziliko de Třebíč (prospekto), Kralice (prospekto)
BLÁHA, Arnošt:	Ĉeĥoslovaka kultura idealo (Verda Stacio, 3.10.1934), Findamentoj de demokratio (Verda Stacio, 21.11.1934)
ČAPEK, Karel:	La Blanka malsano (MEP, Olomouc, 1938) Letero el Ĉeĥoslovakio (Verda Stacio, 20.6.1934)
BŘEZINA, Otakar:	Konstruado en altoj (poezia eseo) (Esperanto-klubo 1982)
HELPERT, Vladimír:	Ĉeĥoslovakio laboranta: La muziko (Verda Stacio, 29.1.1936) La vendita fianĉino (Verda Stacio, 1.3.1935)
HERRMANN, Ignát:	La pentristo kaj fiakristo (Verda Stacio, 1.3.1933)
CHALUPA, Dalibor:	Masaryk-filozofo (Verda Stacio, 6.3.1933) Li kaj Ŝi (Verda Stacio, 28.4.1933) Maja vespero (Verda Stacio, 5.5.1933) La frato de Prometeo – biografia ludo pri T. A. Edison (Verda Stacio, 7. 10.1936)
KALLAB, Jaroslav:	Porpacaj klopodoj (Verda Stacio, 7.11.1934)
TRAUB, Hugo:	La centjara deveno de nia nacia himno (Verda Stacio, 19.12.1934)
WEINGART, Miloš:	La spiritalaj sciencoj (Verda Stacio, 30.10.1935)
WEYR, František:	Ĉeĥoslovakio kaj la nuntempa Eŭropo (Verda Stacio, 4.8.1933) La naciaj malplimultoj en Ĉeĥoslovakio (Verda Stacio, 30.5.1934)
HICHTUMOVÁ, N. van: Th. Kilian	Eskymáček hrdina (Kudlago) – esperantigis S.D. Manoury, enĉeĥigis

Prelegoj de Kilian en Esperantista klubo Brno

1.3. 1955	Th. Kilian	Antaŭrevolucia Rusio. Personaj rememoroj.
17.5. 1955	Th. Kilian (Třebíč)	Okupo de militkaptitoj en Tomsk
21.2. 1956	T. Kilian	Ses mil kilometrojn kiel nigra pasaĝero
19.2. 1957	T. Kilian	Buntaj eroj
5.11. 1957	T. Kilian	40-a datreveno de la Oktobra Revolucio. Bonhumoraj travivaĵoj en Hispanio.
6.5. 1958	T. Kilian	Humuraj kaj seriozaj travivaĵoj el Maroko, Alĝerio kaj Tunizio
12.5. 1959	T. Kilian	Tra Sicilio kaj Italio hejmen al Třebíč
3.11. 1959	Th. Kilian	Kion rakontas egiptaj papirusoj
22.11. 1960	T. Kilian	Fiŝoj kaj fiŝistoj
17.10. 1961	Th. Kilian	Maljuna instruisto rememoras
22.5. 1962	T. Kilian	Kosmonaŭto G. S. Titov kaj liaj gepatroj
2.10. 1962	T. Kilian	Pri kio korespondi kun eksterlando
17.9. 1963	T. Kilian	Instruistoj kaj lernantoj
26.5. 1964	Th. Kilian	Kiel racie lerni
22.9. 1964	Th. Kilian	Racia lingvo-studado
5.10. 1965	T. Kilian	Gajaj kaj tristaj travivaĵoj kun miaj korespondantoj
8.11. 1966	T. Kilian	El mia neaperinta internacia Legolibro
7.11. 1967		Intervjuo kun s-ano prof. Theodor Kilian el Třebíč
1.4. 1969	Th. Kilian	Vespero de Esperanto-kantoj sur diskoj
3.3. 1970	Th. Kilian	Kvin jarojn en Tomsk, Siberio
14.5. 1974	Th. Kilian	Pelé - la nigra perlo de Brazilo
13.5. 1975	Th. Kilian	Genia surdmuta blindulino
11.5. 1976	Th. Kilian	Amuzaj kaj tragikaj travivaĵoj en la militkaptiteco
12.4. 1977	Th. Kilian	El la historio de Verda Stacio